

INTRODUCTION TO EPISODE SIX

TEACHER Hello! Did you find lesson five difficult? If so, listen to it again and restudy the exercises. That way you will understand more and more. In lesson five, you heard another prefix “i” from the “tabelvortoj.”

HELENA “Someone is ringing the doorbell. Someone awaits us.”

TEACHER Iu atendas nin - “iu” means that a person is waiting, but we don’t know which person. It may be a man or a woman, young or old, etc. We only believe that there is a person, whom we do not know, who is waiting. Who is waiting? We don’t know. We just understand that **someone** is waiting.

I - means “not defined”

I + U (individual)	= IU = some undefined individual
I + O (thing or idea)	= IO = some undefined thing or idea
I + E (place)	= IE = some undefined place
I + AM (time)	= IAM = some undefined time
I + EL (manner)	= IEL = some undefined manner
I + OM (amount)	= IOM = some undefined amount
I + AL (cause)	= IAL = some undefined cause.

Similarly, use the prefix “i-“ with “-o”, or “io”, for an undefined thing or idea (“something”); “ia” for an undefined quality (“some kind of”); “iam” for time (“sometime”); “ie” for place (“somewhere”); “iel” for manner (“somehow”); “ial” for motive or cause (“for some reason”); “iom” for quantity (“some amount”).

Now let’s go back to the story to know why Karlo swooned, and what will happen. So watch, listen, and enjoy.

ENKONDUKO AL EPIZODO SES

INSTRUISTO: Saluton! Ĉu vi trovis lecionon kvin malfacila? Se jes, reaŝkultu ĝin kaj restudu la ekzercojn. Tiel vi komprenos pli kaj pli. En leciono kvin, vi aŭdis alian prefikson, “i-“ el la tabelvortoj.

HELENA: Iu sonoras ĉe la pordo. Iu atendas nin.

INSTRUISTO: “Iu atendas nin” - “iu” signifas, ke homo atendas, sed ni ne scias kiu homo. Povas esti viro aŭ virino, juna aŭ maljuna, kaj tiel plu. Ni kredas nur, ke estas homo kiun ni ne konas - kiu atendas. Kiu atendas? Ni ne scias. Ni nur komprenas, ke **iu** atendas.

I - signifas “ne difinita”		
I + U (individuo)	= IU	= nedifinita individuo
I + O (aĵo aŭ ideo)	= IO	= nedifinita aĵo aŭ ideo
I + E (loko)	= IE	= nedifinita loko
I + AM (tempo)	= IAM	= nedifinita tempo
I + EL (maniero)	= IEL	= nedifinita maniero
I + OM (kvanto)	= IOM	= nedifinita kvanto
I + AL (kaŭzo)	= IAL	= nedifinita kaŭzo.

Simile, uzu prefikson “i-” kun “-o”, do “io”, por nedifinita aĵo aŭ ideo; “ia” por nedifinita kvalito, “iam” por tempo, “ie” por loko, “iel” por maniero, “ial” por motivo, “iom” por kvanto. Nun ni reiru al la historio por scii kial karlo svenis, kaj kio okazos. Do, rigardu, aŝskultu, kaj ĝuu!

SCENO 1 (HEJMO)

DOKTORO Trankviliĝu, kara sinjorino. Via filo estas forta kaj juna . . .forta kaj juna ... li kuras ... li estas atleto ... li estas tre, tre sana.

KARLO Be ... ! Mia koro ... ho, mia kor'...

DOKTORO Ankaŭ via koro estas forta kaj sana.

KARLO Ne! Ne! Mia koro . . . !

DOKTORO Eble la varmo, sinjorino. Aŭ lia dieto. Atletoj devas bone manĝi.

KARLO Be ... ! Mi bone manĝas!

DOKTORO Aŭ eble ... ŝoko. Jes. Via filo, sinjorino, ŝokiĝis. Sed ... kial?

KARLO Be ... !

SCENO 2 (ĜARDENO)

HELENA Mi amas vin. “R”. Kio? Mi amas vin ... kaj “R”? Kiu estas “R”? Ho, Ruselo! Sed ... neeble! La kompatinda ŝafisto estas for! “R” - nekredible! “R”! La raportisto? La raportisto, ĉu li amas min?

SCENO 3 (PARKO)

RUSELO Dankon, mantelo! Dankon! Kaj ankaŭ dankon, okulvitroj! Kaj dankon, sinjoro detektivo! Ho, notlibro ... Ah, jes! Ho ... Helena!

SCENO 4 (ĜARDENO)

HELENA Ho, Ken!

SCENO 5 (HEJMO)

KEN Ho ... Flora!

FLORA Terure ... katastrofe!

KEN Ŝi svenas, doktoro. Kaj falas. Kaj tiam ŝi diras . . .

FLORA Mi mortos!

DOKTORO Vi ne mortos, sinjorino Bundo. Certe ne. Ankaŭ vi estas forta kaj sana, kiel la junulo, la kuristo.

DOKTORO Denove sana ... bone! Sed ... kial vi ĵonglas?

KARLO Tio estas bona por atleto ... be! Ĉu vi ĵonglas?

DOKTORO Ne.

KARLO Ĉiu povas. Rigardu! Unu, du, tri ... be ... !

DOKTORO Ĉu vere ... ? Ĉiu povas ... ? Sendube, ne. Nu, sinjorino ...

KARLO Be! Kial hodiaŭ mi ne povas ĵongli? Pro la doktoro ... la bela, ĉarma doktoro!

SCENO 6 (PARKO)

DETEKTIVO Ĉu mia mantelo? Jes ... ĝi estas ja mia mantelo! Kaj ... ne ŝtelita! Sed ... ĉu mi povas kredi al miaj okuloj? Aŭ ... ĉu mi estas freneza? Ve! Freneza!

SCENO 7 (ĜARDENO)

GEORGO Pardonu min, kara Filisa ... mi donis la monon al s-ino Bundo simple por helpi ŝin.

FILISA Mi scias, Georgo. Vi volis helpi. Jen ĉio.

GEORGO Mi tre pardonpetas, Filisa. Sed kion fari?

FILISA Kial vi ne parolis kun mi ... via edzino! Vi ne diris: Mi volas doni nian kongres-monon . . .

GEORGO Ho! La kongreso! Kia stultulo mi estas ... kia idioto! Sed ... ne maltrankviliĝu! Ni rehavos la monon! Certe! Sinjorino Flora repagos al ni la mil kvincent sepdek stelojn!

FILISA Ŝi ne repagos la monon, Georgo.!

GEORGO A! He! Kio ... ?

FILISA Ŝi ne repagos al ni la monon, Georgo.

GEORGO Sed ... la mono estas nia!

FILISA Estis, Georgo ... estis.

GEORGO Sed ... tre plaĉas al mi iri al Universala Kongreso. La U.K.

FILISA Mi scias, Georgo. Ni ĉiuj volas iri al la Universala Kongreso. Ni promesis al ni, ni ŝparis monon.

GEORGO Ni bone, diligente ŝparis ĉiun stelon.

FILISA Sed nun ... ni ne iros al Universala Kongreso. Ni ne vidos niajn amikojn ...

GEORGO Sed, plaĉas al mi trinki vinon kun amikoj dum la Universala Kongreso ...

FILISA Georgo ...

GEORGO Tio estas ... plaĉas al mi trinki ... mineralan akvon dum la U.K.

SCENO 8 (HEJMO)

HELENA Saluton ... Ken.

KEN Ho! Kia ŝoko! Vi surprizis min!

HELENA Ankaŭ vi surprizis min.

KEN Mia pilo! Kie ĝi estas? Jen mia lasta pilo... mi devas aĉeti novajn.

HELENA Ken ... ne gravas via pilo.

KEN Ho, jes. Ĝi tre gravas. Sen piloj ne funkcias mia aparato.

HELENA Ken ...

KEN En la domo ĝi funkcias per elektro ... kompreneble. Sed kiam mankas elektro ... sur la strato, en la parko ... mi devas uzi pilojn.

HELENA Ken ...

KEN Jen ĝi! Mia pilo! Finfine!

HELENA Ken! Ĉu vi ne volas diri ion al mi?

KEN Diri ... ? Mi ... ? Ho! Fraŭlino Helena ... rigardu! Jen ... via papero.
Sed kio ... ? Ho, jes ... mi memoras! Kompreneble mi volas diri ion al vi!
Ĉu mi povas intervjui vin ... pri via bela skulptaĵo?

HELENA Mia skulptaĵo ... ? Ho!

SCENO 9 (PARKO)

RUSELO Sendube, kara ŝafo ... ŝi trovis ... ŝi legis mian noton. Mi amas vin ... R! Ho, kion ŝi opinias? Kion ŝi faras? Kion, kara ŝafo? Jes! Ŝi amas min, kompreneble ... Ne estu stulta, amiko mia! Kompreneble ŝi amas min! Mi scias ... kiam miaj fingroj ... niaj fingroj en la informejo ... kiam miaj fingroj tuŝis ŝiajn fingrojn ... ho!
Ne tiel bleku, kara ŝafo! Kio okazas al vi? Ho jes, certe vi pravas! Mi scias! Mi devas vidi ŝin!
... Mi devas iri al ŝi ... rapidi al ŝi ... por diri: Mi amas vin!

SCENO 10 (HEJMO)

HELENA Idiotoj ... stultuloj ... sentaŭguloj! Viroj! Ho ... mi abomenas ilin!

FLORA Ĉu ... ? Hmm ... stultuloj ili povas esti ... sed ne ĉiuj.

HELENA Ĉiuj! Ili estas sovaĝaj, kruelaj, senkoraj bestaĉoj.

FLORA Ne, ne! Ne ĉiuj! Via patro ...

HELENA Patro estas patro ... patro ne estas viro.

FLORA Ho! Nu ... !

HELENA Mi volas preni ĉiujn virojn kaj rompi al ili la kapojn ... la kruojn ...

FLORA Ho! Viroj ne estas kruelaj ... vi estas! Sed mi ne komprenas. Kial ... kio okazis?

HELENA La senkorulo! Li amas min, jes ... tion pruvi mi povas! Sed nun ... li ne volas paroli kun mi! Viriĉo!

FLORA Sed kiu ... ?

HELENA Nu ... Ken! Kompreneble!

FLORA Neeble! Ken ne estas viraĉo! Mi bone konas lin! Ken estas gasto mia ... amiko mia ...

HELENA Amiko via ... ! Sed ... li amas min!

FLORA Ho, ve, terure! Katastrofe! Mi svenas! Mi falas! Mi mortas!

SCENO 11 (ĜARDENO)

JOLANDA Mi maltrankviliĝas. Karlo tute ne volas diri, kio estas en la pakaĵo. Vi memoras, panjo, sendube ... Li volis kaŝi la pakaĵon ... malantaŭ la dorso ... La pakaĵo estas granda mistero, panjo. Kaj Karlo tre strange agas. Tiel strange kiel ... elefanto en artgalerio.

FILISA Elefanto ... ? Ho, Jolanda ... Karlo ne estas elefanto. Verdire ... li estas malelefanto ... atleto!

JOLANDA Mi scias, panjo. Mi scias. Sed atletoj ... por esti ĉiam fortaj ... por rapide kuri ... foje ili ..

FILISA Drogaĉoj!!

JOLANDA Eble ... kiu scias? Mi tre bedaŭras, panjo .. sed mi devis diri. Por helpi mian fraton .. por kuraci lin.

FILISA Sed Karlo ... certe, ne!

JOLANDA Ofte, panjo, bedaŭrinde, mi vidas en mia juĝejo tiujn, kiuj uzas drogaĉojn. Eble ankaŭ Karlo ...

FILISA Ne! Mi ne kredas ...

JOLANDA Ankaŭ mi ne. Sed ... ni devas scii. Ni devas estis certaj ... ĉu ne?

SCENO 12 (HEJMO)

DOKTORO Feliĉe, sinjorino, vi nek svenis nek mortis. Via sano estas ... mia opinie ... en tre bona ordo.

FLORA Via opinie ... eble. Sed mi ĉiam svenas, falas ...

DOKTORO Vi estas tiel forta kaj tiel sana kiel mi. Trankviliĝu!

FLORA Mi ne povas trankviliĝi. Mi scias, kio okazas en mia korpo ... en mia kapo. Fojfoje sonoras en miaj oreloj ... tin-tin! Tin-tin!

DOKTORO Eble ... eble vi ne bone manĝas. Eble ... kulpas via dieto. Kion vi manĝas? Aŭ ... ne manĝas?

FLORA Mi ne manĝas viandon. Mi abomenas viandon. Mi estas vegetarano.

DOKTORO Ankaŭ mi estas vegetarano.

KARLO Be ... ! Ankaŭ mi!

DOKTORO Do bone ... vi ne manĝas viandon. Do sendube vi manĝas fruktojn. Vi devas manĝi fruktojn.

FLORA Ho, jes. Pomoj plaĉas al mi ...

- KARLO Be ... ! Ankaŭ al mi!
- FLORA Ankaŭ orangĝoj, bananoj . . .
- DOKTORO Bananoj ... bone!
- KARLO Be ... ! Ankaŭ al mi!
- DOKTORO Do ... via dieto estas ĝenerale en ordo. Ne kulpas pri viaj problemoj via dieto. Sed ... ĉu vi drinkas? Aŭ uzas drogaĉojn?
- FLORA Ne! Mil fojojn, ne! Mi abomenas drogaĉojn. Nur idiotoj uzas drogaĉojn ... ĉu ne, Karlo?
- DOKTORO Do ... estas nur unu solvo. Vi tro laboras, sinjorino . . .
- FLORA Ve! Maltro! Jen ... jen la problemo! Mi havas vendejon ... kun varoj el la tuta mondo ... kun fakturoj el la tuta mondo!
- DOKTORO Trankviliĝu, mi petas vin, sinjorino.
- FLORA Mi havas vendejon ... sed malhavas klientojn!
- DOKTORO Sinjorino . . .
- FLORA Kaj nun ... mi devos redoni al Georgo la monon ... sed oni fermos la vendejon! Tiam ... ve! Mi estos senlabora, senmona, sendoma! Terure! Katastrofe! Mi svenas . . .
- DOKTORO Ne! Vi nek svenas, nek falas, nek mortas! Mi malpermesas al vi sveni, fali aŭ morti! Mi ... kiel doktoro ... malpermesas!
- FLORA Jes, doktoro.
- DOKTORO Hmm ... mi devas pensi. Ho! Mi kredas . . . jes! Mi havas ideon!
- GEORGO Ho ... jen vi, sinjorino. Venu! Filisa kaj mi volas paroli kun vi ... en la ĝardeno.
- FLORA Ve!
- GEORGO Jes, ja ... pri la mono. Venu!
- FLORA Ve!
- KARLO Kara doktoro ... mi povas montri al vi, kiel jongli. Estas tre facile . . .
- DOKTORO Ĵongli? Ne, ne.
- KARLO Tre plaĉos al mi montri al vi . . .
- DOKTORO Ne! Mi devas pensi ... pensi pri sinjorino Flora Bundo. Kiel oni povos helpi ŝin.
- KARLO Helpi ŝin ... ? Be ... ! Kial ne helpi min ... kuraci min? Doktoro ... !

SCENO 13 (ĜARDENO)

- FLORA Ho ... mi ne povas kredi ... vi estas tro bonkoraj . . .
- GEORGO Ĉu ... bonvolaj?

FLORA Jes ... jes! Bonvolaj! Ho, mi ne scias, kiel danki vin . . .

GEORGO Ne, ne, fraŭlino! Memoru, kio okazis en la vendejo ... la rompita vazo.

FLORA Ve! La vazo! Kaj la vodko ... ve! Mi tre bedaŭras! Estis akcidento ... fakte . . .

FILISA Certe ... akcidento! Sed nun ... la tuta afero estas forgesita.

GEORGO Forgesita!

FLORA Mi ne povas forgesi. Mi nek volas nek devas forgesi. Kaj mi repagos al vi . . Ne per mono. Per ... per ... ho, mi ne scias! Sed ... eble ... mi havos ideon.

FILISA Certe. Vi havos ideon.

GEORGO Perfekte! Fino bona, ĉio bona!

FILISA Kio ... ? Sed tio ne estas la fino, Georgo. Vi forgesas ion!

GEORGO Kio ... ? Kion mi forgesas?

FILISA Ho, Georgo! Eble ne 'kion' ... sed 'kiun'.

GEORGO Mi ne komprenas, Filisa! Diru, kara!

FILISA Ni forgesas ne ion ... sed iun, Georgo! Kio pri nia gasto ... Ruselo? Li ankoraŭ ne estas trovita!

GEORGO Sed . . .

FILISA Ho, Georgo! Vi ne scias! Ruselo forkuris, kiam la stulta detektivo akuzis lin esti ŝtelisto!

GEORGO Ruselo ... ŝtelisto? Neeble ... !

FILISA Kompreneble ... ĉar vi estis la ŝtelisto, Georgo . . .

GEORGO Kio ... ? Mi ne estas ŝtelisto!

FILISA Ho, Georgo! Vi ne estas ŝtelisto ... nek vi, nek Ruselo! Sed . . tio ne gravas! Gravas nur unu fakto ... Ruselo estas for.

GEORGO Absurde! Mi vidis Ruselon . . .tie ĉi ... en la ĝardeno . . .

FILISA Neeble, Georgo! Tion vi nur imagis.

GEORGO Ne, ne ... mi estas certa. Mi vidis lin tie ĉi en la ĝardeno. Kiam ... kiam mi estis malsana . . .

FILISA Ho, Georgo!

GEORGO Kiam ... kiam venis la doktoro ... doktoro Zamenhof ... kaj kuracis min. Jes ... jes! Tiam mi vidis la ŝafiston!

FILISA Ho, fraŭlino! Mi kredis mian edzon en bona ordo ... kuracita ... denove sana ... sed. . . terure! Aŭskultu ... li vidis fantomon!

SCENO 14 (HEJMO)

HELENA Ken . . .

- KEN Jes . . .
- HELENA Mi tre pardonpetas . . .
- KEN Pardonpetas, fraŭlino Helena? Kial?
- HELENA Mi volas pardonpeti ... ĉar mi tre strange agis ...
- KEN Ne gravas, fraŭlino.
- HELENA Kaj ... stulte ... mi forkuris.
- KEN Ho! Mi estis tre kontenta, kiam vi forkuris.
- HELENA Kio ... ?
- KEN Tio estas ... ne ... ho! Mi volas diri . . .
- HELENA Interrompita!
- KEN Jes ... interrompita! Feliĉe!
- FILISA Nekredeble! Ĉu vi estas surdaj? Ĉu vi ne aŭdis la sonorilon?
- FLORA Ve denove! Tin-tin ... tin-tin ... en la kapo ... en la oreloj ...
- FILISA Iu sonoras ... ĉe la pordo ... iu atendas nin.
- DETEKTIVO Ha! La ŝafisto! Kie li estas? Ĉu li revenis? Mi arestos lin ... baldaŭ li sidos en prizono ... li kaj la ŝafaĉo . . .
- FILISA Sinjoro detektivo! La ŝafisto Ruselo . . . bedaŭrinde ... ne revenis al ni.
- DETEKTIVO Mi ne kredas vin! Vi kaŝas lin ... en la domo ... sub la tablo . . .
- FILISA Sinjoro! Ruselo estas senkulpa!
- DETEKTIVO Malantaŭ la kuseno . . .
- FILISA Sinjoro! Ĉu vi estas surda?
- DETEKTIVO Surda ... ? Mi ne estas surda!
- FILISA Do, aŭskultu! La mistero estas solvita. Ne Ruselo prenis la monon ... sed mia edzo.
- DETEKTIVO Kio ... ? Via edzo ... ? Mi arestos lin!
- FILISA Ne. Li prenis la monon ... akcidente por helpi la fraŭlinon Flora Bundo.
- DETEKTIVO Flora Bundo ... ! Ho, jes! Flora Bundo! La sinjorino kun la aŭto ... la sinjorino, kiu ŝoforas sen permeso!
- FLORA Ne! Ho, ve!
- DETEKTIVO Perfekte! Se mi povos aresti nek la ŝafiston, nek la ŝafaĉon, nek la filozofon ... mi devos aresti vin!
- FLORA Ve! Ho, ve ... terure ... katastrofe!

- DETEKTIVO Vi estas ... arestita! Morgaŭ ... en la juĝejo! Antaŭ juĝisto! Kaj vi pagos . . . ho, jes ... vi pagos!
- FLORA Ve! Mi svenas ... Mi falas!
- DETEKTIVO Jes! Kaj morgaŭ vi mortos!
- FILISA Ne! Ne ... neeble! Hej ... ! Sinjoro detektivo! Momenton!
- HELENA Ho, Ken! Helpu! Faru ion! Savu ŝin! Kara!
- KEN Ne! Ne! Fraŭlino!
- RUSELO Ve! Dekoble, centoble, miloble ... ve!
- KEN Mi petas vin! Ne...!
- HELENA Kio? Sed mi kredis Do vi ne skribis la noton. . .
- KEN Noton? Kiun noton?
- HELENA Vi ne skribis ĝin! Estis... estis... ho terure! Ruselo!

FINO DE LEClONO SES

CONCLUSION TO EPISODE 6

TEACHER Woe! Again catastrophes...again misunderstandings! Poor Ruselo, who saw his girl friend in the arms of the reporter Ken! What will the shepherd do? Well...you will have to wait until the following lesson to see.
In the meanwhile, let's turn to verb combinations. Listen to what Karlo says to the doctor:

KARLO "Do you juggle?" "Do you want to juggle?"

TEACHER Ĉu vi volas ĵongli... did you hear the verb "volas" (want)... and after it the verb "ĵongli" (to juggle)? Grammatically always, when two verbs are together, we use the infinitive for the second. For example: Deziras manĝi (wants to eat) - Komencis skribi (begins to write) - Volos instrui (will want to teach).

Did you notice in the video another use of the infinitive in Esperanto, ..namely, the use of "por + infinitive"? Listen to what Jolanda says to her mother, when she talks about Karlo and the possibility that he uses drugs:

JOLANDA "Maybe...who knows? I'm very sorry. Mom ... but I had to say... to help my brother ... to cure him."

TEACHER Did you hear... por helpi mian fraton (to help my brother)... por kuraci lin (to cure him)? Por + infinitive is used when one wishes to express why one does something.

Notice also the new correlatives. In the previous lesson I showed you a part of the correlative "family" kiu and tiu. To that family we can now add "ĉiu". For example, we will be able to say, "Who likes mineral water?" "Oh, everyone likes mineral water." That means, that there is not a single person who doesn't like mineral water...so everyone willingly drinks it.

Ĉi + u	= ĈIU	= Every individual, everyone
Ĉi + am	= ĈIAM	= All the time (forever)
Ĉi + e	= ĈIE	= Every place, everywhere
Ĉi + o	= ĈIO	= Everything
Neni + u	= NENIU	= No one
Neni + am	= NENIAM	= At no time, never
Neni + e	= NENIE	= No place, nowhere.
Neni + o	= NENIO	= Nothing

Incidentally, the opposite of ĉi-" is the already heard form "neni-" - so, "neniu", "nenie". Soon you will notice - and appreciate - the value of the correlative system - you will even be able to think up correlatives which we haven't already met in the course. For example, what is the opposite of ĉiam"? Picture to yourself the series "ĉiu, neniu...ĉie, nenie"; so... "ĉiam" and...? You're right! "Neniam"! In fact, you won't hear "neniam" until the eighth lesson-.but no matter; thanks to the ease of Esperanto, you will recognize and understand it when you meet it!

But now...again watch the video; stop it, if necessary, to hear it again and more deeply understand it. Then do the exercises, and only after you understand everything, turn to the next, the seventh, lesson.

In the meantime I wish you a good and successful study! Goodbye!